

Kolokvo pri la instruado de esperanto, ĝiaj partoprenintoj kaj rezolucio
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-811/268, k39, 1979 aprilo 26, 28

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okazis en Berno la 31-an de marto kolokvo pri la temo "instruado de esperanto en la lernejoj". Ĝi grupigis pedagogojn esperantistajn kaj neesperantistajn uzante la francan kiel laborlingvon. Unu el ĝiaj tagordaj punktoj estis la ekzameno de raportoj kaj de tezoj. Jen la titoloj de tiuj ĉi dokumentoj:

A.- Kvarpaĝa raporto titolita "Svislando kaj la instruado de esperanto" donis superrigardon pri la ĝisnunaj fazoj de tiu ĉi fako. Ni traduke prezentos al vi tiun ĉi informadon.

Cl.- La dupaĝa raporto titolita "Esperanto en la lernejoj" donas ĝeneralan superrigardon pri la nuna situacio, kiun vi tutcerte bone konas.

A.- Tezo titolita "Vivperiodoj favoraj al la lernado de esperanto" povus esti la bazo de tuta kolokvo. La faktoj, kiujn ĝi prezentas, meritis enketan kontrolon. Ni havos la okazon traduke prezenti al vi tiun ĉi diskutindan faktaron.

Cl.- Alia tezo proponis instruprogramon de esperanto por la duagrada lernejo, tio estas por la periodo, kiu kovras la kvar lastajn devigajn lernejjarojn. Baldaŭ okazos en La Chaux-de-Fonds kolokvo pedagogia, kiu diskutos tiun ĉi projekton. Nur kiam ĝi estos pli matura, ni provos ĝin resume prezenti al vi.

A.- Fine lasta tezo fiksas la ĉefajn trajtojn, kiujn gimnazia instruado de esperanto devus havi, konsiderante, ke la gelernantoj eniras la gimazon jam sciante esperanton, kiun ili lernis dum du jaroj en la duagrada lernejo. Ankaŭ tiun ĉi projekton diskutos pedagogia kolokvo en la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĉio estas fakte tiel nova, ke multo estas ankoraŭ esplorenda.

Cl.- La kolokvo, kiu unuafoje ekzamenis tiujn ĉi dokumentojn en Berno la 31-an de marto, ne havis la tempon detale diskuti ilin. Tiu ĉi ĝenerala diskuto nur povis reliefigi la gravecon de la ekzamenota materialo kaj la tre verŝajna objektiveco de la informado, kiun ĝi alportas. Forestas ĉia propagando tro ofta en la esperanto-projektoj. Bibliografio permesas kontroli la asertojn.

A.- Antaŭ ol raporti pri la rezolucio, kiu konkludis la kolokvon, ni donos la liston de la konsisto de la esperantista kaj de la neesperantista delegacioj. Ambaŭ havas sian signifon. La esperantistoj estas pedagogoj aktivaj rilate al la instruado de esperanto. La neesperantistoj havas gravajn pedagogiajn funkciojn.

Cl.- Jen la konsisto de la esperantista delegacio:

A.- Advokato **Maurice Favre**, kiu estas la notario prizorginta la redaktadon de la statuto de la fondumo Gastejo Edmond Privat, ĉeestis kiel deputito en la neŭŝatela kantona parlamento kaj kiel novbakita esperantisto.

Cl.- Sinjorino **Bluette Faehndrich** kaj **Yo1ande Lauenberger** venis el la urbeto Moutier (Berna Ĵuraso) kun s-ro **Rodolphe Lauenberger**, kiu gvidas la lokan studrondon kaj instruis esperanton en la duagrada lernejo.

A.- Sinjorino **Suzanne Gerber**, duagrada instruistino en La Chaux-de-Fonds, reprezentis la pedagogojn, kiuj havas kelkajn nociojn de esperanto.

Cl.- Sinjorino **Lucie Matthey-Claudet** praktikis la interlernejan korespondadon en la kadro de rondo de Graĵnoj en Vento en vilaĝa lernejo de la kantono Neuchâtel.

A.- Reprezentis Kulturan Centron Esperantistan kaj ties komisionon "Esperanto Lernejen" mia edzo **Claude Gacond**, kiu ĵus verkis raporton pri eksperimenta instruado de esperanto disvolviĝinta en la kvara kaj kvina klasoj de la baza lernejo La Promenade en La Chaux-de-Fonds, **Jean-Jacques Lavanchy**, la prezidanto de la komisiono "Esperanto Lernejen", kiu instruis esperanton en la urbo La Tour-de-Peilz (kantono Vaud), s-ino **Perla Martinelli**, la sekretario de Kultura Centro Esperantista, kiu gvidas perfektigajn kursojn de esperanto en la kadro de Internacia FERIA Altlernejo, **Ulrich Moser**, la redaktoro de la franclingva informilo de la komisiono Esperanto Lernejen, **Claude Piron**, psikologo kaj lingvisto instruanta en la Universitato Ĝeneva kaj konata en esperantujo sub la pseŭdonomo verkista **Johan Valano**, **Giorgio Silfer**, la kursestro de Internacia FERIA Altlernejo kaj fine **Olivier Tzaut**, la sekretario de la komisiono Esperanto Lernejen.

Cl.- La kolokva rezolucio listigas la ĉisekvajn neesperantistajn subskribintojn:

A.- **Marc-Alain Berberat**, kiu estas direktoro de la porinstruista lernejo en la urbo Porrentruy, kantono Ĵuraso, kaj prezidanto de la sindikato de la ĵurasaj instruistoj.

Cl.- Sinjorino **Madeleine Milhit-Luy**, instruistino en la urbeto Saxon, reprezentis la kantonon Valezo.

A.- Sinjoro **Jacques Paroz**, instruisto en St-Imier, Berna Ĵuraso, estas prezidanto de la Societo de la Instruistaro de Berna Ĵuraso.

Cl.- S-ro **Jean-Pierre Rausis** estas direktoro de la Oficejo pri serĉado kaj dokumentado lerneja en Sion, kantono Valezo.

A.- Sinjoro **Jean-François Robert** estas instruisto kaj subdirektoro de duagrada lernejo en La Chaux-de-Fonds, kantono Neuchâtel.

Cl.- Sinjoro **Samuel Roller**, eksdirektoro de la instituto pri serĉado kaj dokumentado pedagogiaj por Romandio kaj Tiĉino en Neuchâtel, prezidis la kolokvon.

A.- Fine s-ro **Roland Vuataz**, direktoro de la Muzika konservatorio en Ĝenevo estas deputito en la parlamento de tiu ĉi kantono.

Cl.- Ĉeestis aliaj observantoj, kiuj, pro siaj funkcioj en la instruado, ne povis subskribi rezolucion, ekzemple lernejspektoroj.

A.- La rezolucio, kiu konkludis la pedagogian kolokvon, post listigo de lingvaj kaj pedagogiaj kvalitoj karakterizantaj esperanton, esprimis la dankon de la kolokvanoj al la urbo La Chaux-de-Fonds pro la apogo, kiun ĝi alportis al Kultura Centro Esperantista faciligante al ĝi la akiron de domoj kie stariĝas Gastejo Edmond Privat kaj kie jam disvolviĝas pedagogiaj seminarioj en la kadro de Internacia FERIA Altlernejo kunlabore kun la komisiono Esperanto Lernejen.

C1.- Poste la kolokvanoj sin gratulas pro la disradiado, kiun alportas al la urbo La Chaux-de-Fonds la ekzisto de la ĵus menciitaj institucioj.

A.- La kolokvanoj formulas la deziron, ke la urbo La Chaux-de-Fonds aŭspiciu la dissendadon de dosieroj pri la esperanto-instruado al la kantonaj instru-departementoj, krome ili esperas, ke La Chaux-de-Fonds vekos instrueksperimentojn de esperanto, kiuj tuŝos nombron sufiĉan da gelernantoj kaj ke fine tiu ĉi urbo akceptos kunvoki novan internacian konferencon pri la esperanto-instruado en la lernejoj.

Cl.- Ni ne scias, kiel reagos la aŭtoritatoj de la urbo La Chaux-de-Fonds al tiu ĉi rezolucio, kiu ĝin rekte koncernas.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!